# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-56 sendita el Budapeŝto la 20an de decembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 80 serve al la ĉina movado

Tiu seminario okazis en la 15a de decembro, kaj kunigis la sekretariojn el 25 provincoj de la giganta lando. Sekvas la programo, en la PDF mi lasas la ĉinajn skribojn, por demonstri praktike, ke ni subtenas ne nur lingvan sed eĉ alfabetan diversecon. Ĉinio estas la plej membrolivera lando al UEA, do la Asocio nepre sekvu ĝian evoluon. Ni alkroĉas mian enkondukon al la seminario. La cetera programo havis 14 prelegontojn:

**14:30** 【安徽】安徽省世界语协会 刘保国
新媒体语境下如何让世界语走向公众
Kiel konduki Esperanton al la publiko en la kunteksto de novaj amaskomunikiloj?

**14:35** 【江苏】常州市世界语协会 徐云颖
Nova epoko, Nova komenco——Estontecaj agadoj transkulturaj, transregionaj kaj transtempaj

**14:40** 【黑龙江】黑龙江省外国语学会世界语分会副会长兼秘书长、哈尔滨宇通世界语发展研究所所长 宋萍；2022年如何开展当地的世界语活动
Kiel organizi lokajn agadojn en 2022?

**14:50** 【山东】临沂市世界语协会 张兆庚；临沂世协，创新发展在路上
Linyi-a Esperanto-Asocio, sur la vojo de novigo kaj disvolvo

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François Lo Jacomo

**ENHAVO**

- AMO 80 por Ĉinio kun 25 provincestroj
- Zamenhofaj Tagoj tra la mondo – multaj raportoj!
- Antaŭen al 2022!






**15:00** 【江苏】苏州市世界语协会副会长 王学
世界语苏州会客厅：感知中国，用世界语向世界讲好中国（苏州）故事
Rakontu la historion de Ĉinio (Suzhou) en Esperanto

**15:05** 音乐/休息时间 **Muzika paŭzo**

**15:10** 【上海】上海市世界语协会秘书长 张涵
审时度势，面向青年，做好世界语推广工作
Informado pri Esperanto en junulаro (vidu la foton)

**15:15** 【北京】北京市世界语协会副会长 肖火力
世界语遇上元宇宙
Esperanto renkontu Metaverson

**15:20** 全国世协青年工作部代表 宋振远
各地高校世界语活动的探讨与创新
Junulara agado en universitatoj)

**15:25** 全国世协教师工作部代表 邢起双
世界语伴柏小志高行远
Esperanto akompanas nian lernejon al pli bela estonteco

**15:30** 【天津】天津市世界语协会 林丽莎
Elsendu ĉinan voĉon, rakontu pri Ĉinio kaj grandigu amikan rondon de esperantistoj

Chen Ji, Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo
Tel: 86 10 68996130；13126784506, Adr. P.O.Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

## Rusaj ĵurnaloj atentas nin

Post la sukcesa interveno de esperantistoj en la urbo Sergijev Posad, Moskva Regiono, en unu el la plej gravaj lokaj ĵurnaloj aperis du artikoloj pri Esperanto:
http://vperedsp.ru/novosti/353-nomer-088-16054-ot-17-11-2021/23308-bonan-tagon-ne-pustoj-zvuk
http://vperedsp.ru/novosti/354-nomer-091-16057-ot-24-11-2021/23349-gruppa-krovi-esperanto

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

**Remembrigu vin nun al UEA, ILEI kaj viaj lokaj kaj fakaj kluboj!**

# Zamenhofaj festoj tra la mondo

Kompreneble, okazas multaj dekoj da festoj, eble eĉ cent. Ni ne povas raporti pri ĉiuj. Sed jen koncizaj informoj pri kelkaj el ili.



## Burundo

Hodiau, en nia Esperanto centro de Rumonge en Burundo, ni festis kun niaj infanĝardenoj la Zamenhofan Tagon. Estis granda plezuro manĝi  kaj kanti kun infanoj.






Manirakiza Aime Patrick



## Ĉeĥio




Parka renkontiĝo en Prago, ĉe Esperanto-monumento.



## Ĉinio kaj IKEF tra la mondo

La 12an de decembro 2021 IKEF okazigis sian 44an DK (Dimanĉan Kunvenon) omaĝe al la 162a datreveno de doktoro L.L.Zamenhof. La kunveno estis distra kaj ĝin partoprenis 104 esperantistoj kaj komencantoj el 10 landoj, nome, Brazilo, Ĉinio, Irano, Kanado, Koreio, Mongolio, Nepalo, Pollando,Turkio kaj Vjetnamio.

La kontribuintoj prezentis siajn programerojn jene:

- Enkonduka kaj konkluda paroladoj de IKEF-Prezidanto, s-ro Ĉielismo  Wang Tianyi;
- Salutparolado de s-ro LEE Jungkee, Prezidanto de la Seula Esperanto-Kulturcentro
- Himno "La Espero" (laŭ fidbendo de la Siana Esperanto-Asocio;
- Deklamo "La Tagiĝo", s-ro Lazaro ZHAO Jianping el Ĉina Radio Internacia;
- Prezentoj el Koreio: "La Vojo"  de s-ino Amira Chun; kanto "Al Zo" de  Koruso kun Amira;
- Deklamoj de instruistinoj de la Dongfang Lernejo kaj s-ino Fabina YU Ximei, Ĉinio;
- Deklamo de s-ro Fabricio Valle, Brazilo;
- Joga danco "Lotuso", dancistoj de Xinxiang-a Esperanto-Asocio;
- Deklamoj je kelkaj mongolaj proverboj "La Monda Trio" per prezentaĵo en Esperanto kun mongola kaligrafio, s-ro Chimedtseren Enkhee kaj per videaĵo de s-ino Khorloo Tserendejid;
- Plus prezentoj de la IKEF-Kursanoj, nome:

# Francio

Se vi sukcesas vidi en Fejsbuko:

https://www.facebook.com/henri.masson.9/posts/5149380568440009

# Hungario

1. En nia Zamenhof festo ni ŝatis aŭdi la prelegon de sinjoro **Blazio Vaĥa**, ĉefa scienca kunlaboranto de Hungara Scienca Akadamio. La temo de lia prelego estis: **Zamenhofaj vojo kaj temaro**.  **https://fb.watch/9TrnDYQlSD/**

2. Sinjoro **Miklós Simonyi**, la nova prezidantarano de Hungara Esperanto Asocio, recitis **verkon de Zamenhof, La Vojo-n** en nia Zamenhof festo. Dankegon !

**https://fb.watch/9TrEmVv4Br/**

3.Jen valora prelego de sinjoro **SILFER** en nia Zamenhof festo **pri la centjara HEROLDO**.

**https://fb.watch/9Ts0bVvn69/**

# Italio

Mesaĝo kiu disiris al la Sekcioj de ILEI.

j
https://www.youtube.com/watch?v=g7rPHvygR8k

Bonan Tagon de la Esperanta Libro!

Alessandra Madella

# Japanio

Hieraŭ la 51a Kanagawa Zamenhof-Festo hibrida gaje kaj sukcese finiĝis! La gubernio Kanagawa situas najbare de Tokio kun 9,2 milionoj da loĝantoj. En ĝi estas kelkaj Esperantaj

grupoj kun urbaj nomoj: Yokohama, Kawasaki, Fujisawa kaj Odawara, ktp. Ĉi-jare nia grupo Esperanto-Societo de Kawasaki organizis ĝin.



## Kameruno




## Kongo DR




Tiu ĉi ĉambro apartenas al la mezlernejo RUTOBOKO. Tie mi instruas Eon al mezlernejanoj. Temas pri biblioteko konstruita danke al monhelpo de Penny VOS el Aùstralio.
Ŝi estas membro de nia asocio Solidareca Bonvolo, SBV sed la Zamenhofan tagofeston aranĝis Goma E klubo.

WASEKA KAMANGO Alphonse el Goma, DR Kongo.

Okaze de la Zamenhofa tago, la grupo de virinoj (EVA-DRK) organizos etosan tagon kun la temo: FESTO. Dum tiu tago, ni vendos la pudrojn de MORINGA kaj KURKUMA kiuj ni virinoj mem faris MORINGA kaj KURKUMA estas plantoj, kies respektivaj sciencaj nomoj estas *Moringa oleifera* kaj *Curcuma longa*. Temas pri esceptaj plantoj ĉar ili havas multajn propraĵojn, i.a kosmetikajn, medikamentajn. Tiuj spicoj estas tre bonaj por la sano, la vicprezidantino de nia grupo klarigis iliajn valojrojn en niaj korpoj. La Z-festo ricevis la salutojn de oficantoj: kune kun informoj pri ekspozicioj. La programo finiĝis per diversaj ludoj kaj festa koktelo.

El la urbo Mbanza Ngungu venis informoj pri la celebrado de la Zamenhofa tago, kiu okazis sabate la 18an de decembro 2021 La programo estas jene prezentita: futbalmatĉo inter la teamo de la kvartalo Athennée kaj la esperantistoj, akceptado de la neesperantistaj invitontoj, bonvenigaj vortoj fare de la vicprezidanto de Verda Flago, sro Luzayamo, komuna kantado de la esperanta himno . Poste la vicprezidanto de Verda Flago en kelkaj vortoj klarigis la kialon de la Zamenhofa tago, precipe celante la neesperantistan publikon. Fine, komuna fotado kaj spektado de la filmo ESPERANTO ESTAS, ĉirkaŭ koktelo.

Arlain Kizeyidioko, la sekretario.

# Rusio

La 13-an de decembro nia kluba kunveno en Moskvo estis dediĉita al L.Zamenhof kaj Tago de la E-libro. En la programo; okazos prelego pri L.Zamenhof, kvizo, aŭkcio, libroservo kaj abunda festa tablo. Bonvolu kunhavi monon por aŭkcio kaj eventuala libro-aĉetado.

Irena Gonĉarova kaj Svetlana Smetanina

**Jen nia resumo pri la Z-festoj de 2021 – neimagebla malfacile kompilita! Nun ni pluiras plenvapore al la nova jaro kaj niaj klopodoj intensiĝi la agadon, precipe la landan, lokan kaj fakan. EKO restas preta raporti kaj subteni viajn strebojn.**

========= vortoj: 1240 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **7a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.